# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 4 N° 7 NOV. 1984


## ATENTINDAĴOJ

LA VENONTA ESTRARKUNSIDO DE FEL OKAZOS JE SABATO 8-A DE DECEMBRO 1984 EN ESPERANTODOMO (DO, NE KIEL INDIKITE EN LA JAR-LABORPLANO)

## GAZETARA SERVO

BONVOLEMULOJ NE FORGESU REGULE SENDI VIAJN KONTRIBUAĴOJN AL HERMAN KAJ ANNIE DECEUNINCK-BOLLAERT.

LA GAZETARA SERVO POVAS BONE FUNKCII NUR SE NI KIEL EBLE PLEJ MULTE KUN-LABORAS.

TEMAS PRI I.A. ELTONDADO DE APERINTAJ ARTIKOLOJ, DE REAGOJ AL ARTIKOLOJ, DE VERKADO DE "LETEROJ DE LEGANTOJ" K.S.

PRI ĈIO KION VI FARAS TIURILATE, BONVOLE SENDU KOPION AŬ RAPORTETON AL HERMAN KAJ ANNIE.

DANKON PRO VIA KOMPRENO KAJ KUNLABORO.

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTOLIGO
Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
Telefono 03/234 34 00

Jarabono : BF 150,- Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

---

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto : | Ivo DURWAEL, Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | 03/440 30 92 |
| Sekretario : | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 06 |
| Financoj : | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM | 053/77 44 97 |
| | Paul PEERAERTS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Informado : | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 62 66 |
| Intergrupa agado : | Hilde VAN INGELGEM, Arbeidstraat 21<br>9300 AALST | 053/70 50 11 |
| | Trees DOOMS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Junularo : | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 24 |
| Kadrokursoj : | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN | |
| Literaturo/eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN | |
| Gazetara servo : | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b. 4, 1500 HALLE | 02/360 17 22 |
| Sciencoj : | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 49 |

Provincaj respondeculoj :

| | | |
|---|---|---|
| Brabanto : | M. Th. HENQUINEZ<br>Lipsestraat 166, 2991 TILDONK | 016/23 61 90 |
| Limburgo : | Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113, 3558 HELCHTEREN | 011/53 64 10 |
| Okc. Flandrujo : | vakas | |

---



# P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabata 3-a de novembro 1984 en DE PINTE

Ĉeestas : Erik D'HONDT (ER), Ivo DURWAEL (ID), Edward SYMOENS (ES),
Hilde VAN INGELGEM (HVI) kaj Jan BOVENDEERD (JB)

Senkulpigon petis : Trees DOOMS, Paul PEERAERTS kaj Jules VERSTRAETEN

Prezidas : ID

Protokolas : JB

Komenca horo : 10.30 h.

1. La protokolo pri la antaŭa estrarkunsido (6-a de oktobro) estas aprobita.

2. Gazetara Servo :

2.1. ES havas la impreson ke Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaerts ankoraŭ ne trovis la bonan formulon. Ŝajne mankas iniciatoj.
Kion fari ?
Certe estas ke gazetara servo povas bone funkcii nur se estas sufiĉe da kunlaboro.
Ni jam alvokis al niaj grupoj kaj membroj eltondi kaj sendi artikolojn al H. kaj A. reagi al artikolojn, verki "leterojn de legantoj" ktp., sed ĉiam sendi kopion al H k. A.
Ĉu tio ankoraŭ funkcias ?

2.2. Ĉiu konsentas ke necesas ripeti, ripetadi eĉ. Tial decidiĝas ke JB estonte ripetos la aferon en ĉiu numero de INFORMILO sub la titolo ATENTINDAĴOJ, en la unua paĝo de la bulteno.

2.3. ID atendigas ke en la planita nova kadrokursoserio troviĝas interalie kursotago pri gazetaro kaj radioelsendoj.

2.4. ID proponas ankaŭ venonte en ĉiu estrarkunsido pripensi kion sugesti al Herman kaj Annie.
Por la nuna momento ni povas jam atentigi pri ekz. la 125-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof kaj la 30-a datreveno de la konsultaj rilatoj kun UNESKO (decembro 1954 - Montevideo)

2.5. Sentiĝas ankaŭ la neceso povi disponi pri lokaj kunlaborantoj, instigi la grupestrojn indiki almenaŭ unu persono kiu okupiĝos pri la gazetara servo kaj komuniki tion al la respondeculoj, Herman kaj Annie, do. HVI promesas zorgi pri listo de tiuj personoj.

3. INFORMILO.

3.1. En unu el la antaŭaj kunsidoj ID proponis, cele al ŝparado de mono, ne plu aperigi INFORMILON ĉiumonate, sed nur kvar fojojn jare kun resumo

de tiuj aferoj, kiuj vere interesiĝas al la grupoj.
Tamen, li opinias ke ni devas reprikonsideri tiun proponon, ĉar INFORMILO fakte estas la nura vera kontakto kun la grupoj.

3.2. Li proponas do konservi INFORMILOn en ĝia nuna formo, sed plu sendi ĝin nur al veraj interesitoj.
Rilate al tio, ni petos de Paul Peeraerts liston de la nunaj ricevantoj por priekzameno kaj decido pri kiuj estonte ricevos INFORMILON.
Tio ĉi okazos en la venonta estrarkunsido, je la 8-a de decembro.

4. Belgio - Ĉinio

Alvenis letero de la asocio "België - China" petante akcepti du delegitojn de "Beijing Information" por konatigi ilin kun nia movado.
Ĉar tio plej bone okazos sur loka nivelo, ID kontaktiĝos kun tiu asocio por la aranĝo de tiu akceptado kadre de la programaro de LA VERDA STELO.

5. BUĜETO 1985

ED ellaboris tre detalan kaj klaran buĝeton kaj prezentas ĝin al la estraro.

5.1. La buĝeto estas unuanime akceptita kun kelkaj rimarkoj jenaj :

5.2. La regularo de la "VERDA KONTO" = nia Ŝparkonto, estu adaptota kaj do repripensota kaj diskutota.

5.3. La estraranoj ensedu siajn kostonotojn.
ED preparos formularon por ke estu ia unuformeco.

5.4. Ni ekzamenu ĉu ĉiuj eblaj subvenci-eblecoj estas eluzitaj (ŝtataj, provincaj k.s.)

6. TAXI-STOP, VAB ...

ID prezentas ideon pri kunlaborado kun TAXI-STOP, VAB k.s. pri eblaj komunaj aranĝoj.
Ankaŭ BEFA ( Belga Esperantista Fervojista Asocio) ŝajnas ineresata en tio.

7. KADROKURSOJ / KOLOKVOJ

7.1. Laŭ propono de André Staes, ni klopodos kombini ilin kun la monataj estrarkunsidoj kaj adapti la temojn al la lokaj eblecoj. Tio signifas memkompreneble ke la estraro denove organizu provincajn kunvenojn kiel tio jam okazis en la pasinto.

7.2. BEF promesis okupiĝi pri jenaj kadrokursoj :
- liberaj radiostacioj
- gazetara servo
- rapidkursoj



7.3. Restas por FEL : INFORMILOJ
Historio de la Esperanto-movado, specife la Flandra
Strategioj por la Esperantomovado
Psikologiaj leĝoj de la sukceso
Vidu pli da detaloj en la antaŭa numero de INFORMILO.

Fino de la kunsido : 12.30 h.

---

MALLONGE PRI LA ĜENERALA JARKUNSIDO DE BEF
okazinta je sabato 20-a de oktobro en Bruselo, "Tea Room" de la Centra Stacidomo

Raportas Ivo Durwael.

Unue okazis la kutima prezentado de diversaj raportoj (APE, FEL, BEF, BEFA SONORILO kaj Financa)

La superrigardon de FEL, vi trovos aliloke en ĉi bulteno.

Interese sendube estas mencii, ke kie antaŭe SONORILO asertis (kaj surbaze de tiuj asertoj, ankaŭ niaj samideanoj el la aliaj landpartoj ), ke vendiĝis pli da libroj al Valonoj kaj Bruselanoj ol al Flandroj, evidentiĝas ke en 1983 la vendado estis jena :

21 % vendiĝis al eksterlando
33 % al Valonujo
3 % al Bruselo
43 % al Flandrujo

Por 1984 tiaj ciferoj estos neverŝajnaj, ĉar nun FEL disponas pri sia propra libro-servo.

Krom tio estis alvoko pri kunlaboro inter FEL kaj BEF rilate ĉefe al kadrokursoj.

---

J U B I L E A  J A R O  -  K L U B O  1 0 0

La supremenciita ĝenerala kunsido estis sekvata de kunsido de Klubo 100.
André Staes komparis la jubilean jaron de 1959 kun tiu de 1987.
1959 havis nur 2-jaran preparadon, 1987 6.
En 1982 aperis broŝuro de UEA pri "Kiu faru kion".
20 LA kompilis programon. Ekzistas simileco en la landaj programoj :
1) Solenaĵoj - plej bela loko - muzikistoj - elstara preleganto

2) Memorajoj : Esperanto-stratoj (komp. 1959)

3) Konkursoj (teatrajoj, prezentado, poezio, artajoj, afiŝoj, 100-foja komunikado per radio)

4) Sub la titolo "La Esperanto-movado volas prezenti sin" :
   - ekspozicioj
   - poŝtmarkoj
   - filmoj
   - informiloj
   - revuoj
   - nacia patrona komitato. (Pri tiu ĉi lasta punkto, Klubo 100 jam decidis en antaŭa kunsido atendi ĝis post la elektoj de 1985 por starigi patronan komitaton, ĉar estas atendebla verŝajno ke la tiam elektotoj restos ĝis la jubilea jaro.)

Ekspozicioj : okazos en Orient-Eŭropo en Bulgario (atingoj de Esperanto) k Ĉekoslovakio (interpopola amikeco)
UEA intencas disponigi (kun-)porteblan ekspozicion.

Poŝtmarkoj : jam 8 landoj planas tion, klopodante akiri kiel eble plej multe da simileco inter ili.

Filmo - Televido : nun jam okazas radio-elsendoj.
Bulgario preparas filmon pri Esperanto.

Informiloj - varbiloj - revuoj : CED en 1959 eldonis dokumenton tradukendan en naciaj lingvoj. Nun okazos same. Ankaŭ estos eldonita broŝuro por patronaj komitatoj.

Eldonado : Planataj estas : Antologio, Historio de Esperanto, la "Baza Libro" (W. Auld) tradukenda nacilingven, Enciklopedio, Memorlibro.

Lerneja agado : planoj ekzistas por eldoni broŝuron por mezlernejanoj, dedi[...] lecionon pri Esperanto.

Klubo '87 de UEA (ekz. KEL, ŝtataj instancoj (loterio), aŭkcioj, futbalmatĉo...)

Festivaloj okaze de kongresoj (UK), kunlaboro inter plej diversaj Esperanto-asocioj.
Landa Unesko-komisiono, la ĉefurbo proponi en la IPK
Internacia kunordiga kerno
Lumigi la ideojn pri konkretaj eblecoj de Esperanto.

-------------Kadre de la kunlaboro-plano pri kiu temas en la BEF-raporto, konsentiĝas ke BEF/APE okupiĝos pri la organizado de kadrokursoj pri :
- Gazetara servo
- Liberaj radioj
- Rapidkursoj



ERATUMO

En la letero de nia prezidanto en la antaŭa numero de INFORMILO, la kompostdiableto erarigis nin.

En la tria linio de la 1-a alineo, vi legu anstataŭ " ... ni elspruĉis ideojn. "... ideoj elŝprucis..." kaj plie, anst. "... pezado .." vi legu ".. pesado ..

En la piednoto, P. 7, same legu "ideoŝprucigo"

GRATULOJ

Pro geedziĝo :

al Ite Tytgat kaj Alex Humet, kiuj geedziĝis je 08 09 1984

al Gerd Jacques kaj Guido Van Damme, kiuj geedziĝis je 10 11 1984

Al ambaŭ paroj, niajn plej sincerajn dezirojn pri feliĉo kaj prospero.

Pro gepatriĝo

Je 01 11 1984 naskiĝis al Ges-roj Paul Peeraerts kaj Trees Dooms, respektive Direktoro de GCA kaj estraranino pri intergrupa agado, filino nomita KAREN.

Krom niaj gratuloj kaj deziroj pri feliĉo, sano kaj prospero ankaŭ nia admiro kaj laŭdo pri io tute speciala :

Jen kio akompanis ilian sciigon pri la naskiĝo :

" Volonte varmajn bondezirojn, sed prefere ne donacojn. Ni dezirus helpi ekspedi kargon da laktopulvoro al infanoj en Haitio. Tiucele vi povas ĝiri al konto 737-6203071-61 de Sòley Lévé kun mencio "Infanoj Haitio"

Ĉu ne admirinde ?

--------------

K L U B O 1 0 0 - pagis al BEF ĝis fino de oktobro (daŭriga listo )

Eratumo: en antaŭa listo S-ino ERNST estis meciita kiel paginta BF 3000,-
Tio devus estis BF 1000,-

| | | | |
|---|---|---|---|
| | | 52. DEBROUWERE | 1000 |
| 47. BURNAY | 1000 | 53. JADOT A. | 1000 |
| 48. DE SUTTER L. | 1000 | 54. VAN DOOREN F. | 250 |
| 49. SLABBINCK L. | 1000 | 55. DE HANTSELLES | 100 |
| 50. TSIRIMOKOS A. | 2000 | 56. STAES E. | 500 |
| 51. THILIE J. | 500 | 57. LIEGE ESPERANTO | 1000 |

Pagintoj de BF 1000,- estas konsiderataj membroj de Klubo 100.

--------------------

# VLAAMSE ESPERANTOBOND

# FLANDRA ESPERANTO-LIGO

[illegible]
Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN

## S U P E R R I G A R D O

pri niaj akitvecoj en la periodo inter 01 07 1983 kaj 30 06 1984

---

Sendube pro la feria periodo, la vera agado komenciĝis per la kongreso en Leuven de la 9-a ĝis la 11-a de septembro 1983

La kongreso estis interesa kaj sukcesa, tiel el organiza, kiel el enhava vidpunktoj. Ĝin partoprenis 78 personoj diverslingvaj, kaj ne nur el Belgio.

La ĝenerala temo de la kongreso estis "INTERNACIA KOMUNIKADO". Tamen, prelegoj kaj kunsidoj okazis rilate al pluraj temoj, i.a. :

- Internacia Komunikado, gvidata de S-ro Paul Kempeneers
- Kominukado, vidpunkto de minoritata plejmultano - Gvidata de Petro De Smedt
- Gazetara agado - Germain Pirlot
- Eŭropa Komunumo - tradukservo - Angelo Tsirimokos.
- E.E.C. - Anne Tilmont
- Mondlingvaj projektoj - Fernand Roose.

Tre aktive partoprenata estis la seminario pri ĝenerala kaj intergrupa agado.

Okaze de la solena malfermo, festparoladis Willy Kuypers, Parlamenta Kvestoro.

Aliflanke, FEL partoprenis en la oficiala ekspozicio kaj seminario pri komunikado en Bruselo (22.11 - 08.12.1983)

Kreiĝis propra libroservo, kunlabore kun FLEJA, sub la nomo "Libroservo FEL/FLEJA" Ĉefaj karakterizoj : FEL prizorgas la libroservon ĝenerale, FLEJA tiun ekster la Esperanto -Centro, t.e. okaze de kongresoj kaj similaj renkontiĝoj.

- FEL eldonis intertempe la "Manlibro por aktivuloj - dua parto"-n kaj detektiv-romanon "Jaĥto verturas for .." de Deck Dorval.

La membronombro denove pli-altiĝis post kelkjara malpliiĝo.

Pri la kadrokursoj nenio nova, depost kiam ni lasis ilian organizon al BEF.

Pri nia partopreno en KLUBO 100 kaj en la jubilea programo, ni supozas ke estos raportate kadre de tiu komisiono.



En novembro 1983 E. Symoens kaj A. Tilmont renkontis en lia hejmo, S-ron W. Kuypers kiu jam en la kongreso en Leuven sin esprimis favore al Esperanto. Nun li promesis serĉi personojn en la kvar grandaj politikaj partioj por formi por-Esperantan kernon en la parlamento.

La eldonejo "De Sikkel" akceptis eldoni en la serio "Historische Verhalen (Historiaj Rakontoj)", uzataj en la bazaj lernejoj, kajeron pri la vivo de Zamenhof, verkitan de R. de Roover.

Je 05 11 83 okazis balo nome de FEL en la salono "Alpheusdal" en Berchem-Antwerpen.

Rilate al plibonigo de intergrupa agado, FEL decidis - kaj jam realigis tion - duobligi la flavajn paĝojn en ESPERANTO PANORAMA, malfermante ilin al la grupoj por publikigi siajn klubajn komunikojn kaj tiel atingi pli grandan publikon.

FEL ankaŭ plusendis ESPERANTO PANORAMA-n al eksmembroj, cele al ebla rekaptado.

La provincaj ĝeneralaj kunvenoj ankaŭ ĉi jare okazis. Ili evidentiĝis esti tre valoraj kontakteblecoj intergrupaj.

En la ĝenerala jarkunsido en marto 1984 elektiĝis nova prezidanto en la persono de Ivo Durwael.
Nova iniciato depost tiam estas jam eldono de "Librovermeto"; monata bulteneto pri novaj eldonoj kaj/aŭ specialaj libro-ofertoj.

Kontraŭ la intenco de la Eŭropaj Instancoj eldoni identec-kartojn en la gepatra (regiona) lingvo kaj la angla, FEL protestis. Ĉu nia protesto iel efikis, ni ne scias, sed ŝajnas ke la identeckartoj restos en la gepatra (regiona) ligvo de la portanto.

En la sino de FEL, sed tio okazis samtempe kadre de KLUBO 100, decidiĝis starigi ekzamenkomisionon bazan kaj mezgradan. Ni petis al UEA krei diplomojn aŭ atestilojn. Respondon ni ne ricevis, sed ni jes scias, ke UEA petis al Grafika Centro, Antwerpen presi ilin. Kelkaj ekzempleroj jam estas transigitaj al M. Demonty. Ni ankaŭ petis antaŭsubskribitajn ekzemplerojn de la atestilo, sed ankaŭ al tio ne ricevis respondon almenaŭ ankoraŭ ne je la verkado de la nuna raporto..

Planoj por la estonto :

Antaŭ ĉio plifirmigi la ligojn kun la lokaj grupoj kaj plivigligi la ĝeneralan agadon. Ke niaj lokaj respondeculoj interesiĝas pri tio, pruvis la multnombra partopreno en nia kolokvo okaze de nia dua kongreso en Aalst, komence de septembro.

JB.

-----------